HÉROUVILLE-ESPÉRANTO
Maison des associations - 10-18, Le Grand Parc - 14200 Hérouville Saint-Clair - esperanto.herouville.14200@gmail.com

Magazine édité par l'association Hérouville-Espéranto - Maison des associations - 10.18 Le Grand Parc - 14200 Hérouville Saint-Clair
Directeur de la publication : Bertrand Verstraete - Korektis : Françoise Noireau - Imprimé par nos soins - Dépôt légal mars 2026 - ISSN 2648-3203 - Prix : gratuit.
Deponita ĉe Bibliothèque Nationale de France, Österreichische National Biliothek (Vieno, Aŭstria)
Archives départementales du Calvados, Fonds Normand de la Médiathèque Alexis de Tocqueville (Caen), Bibliothèque de Cherbourg,

NORMANDA ESPERANTO-BULTENO

Frontartikolo

espéranto France

# La 2026a kongreso de Espéranto-France okazos en Hérouville Saint-Clair de la 23a ĝis la 25a de majo

(antaŭkongreso la 22an, postkongreso la 26an)

Ĉu vi ne ankoraŭ aliĝis al la kongreso?

Ne maltrafu la okazon konatiĝi kun esperantistoj el la tuta lando sed ankaŭ el aliaj landoj, malkovri la Esperantan heredaĵon, kune festeni, kanti, kuiri, spekti filmojn, ludi, lerni, ekskursi...

**Aliĝu kiel eble plej frue: la 19an de aprilo plialtiĝos la kosto de la aliĝo.**

Por informiĝi pri la alloga programo, ricevi pliajn informojn kaj aliĝi, sekvu tiun ĉi ligilon aŭ alklaku nian fetiĉon:

**https://kongreso2026.esperanto-france.org**

Ni esperas vian partoprenon!

Gis baldaŭ!

Bertrano

Hérouville-Espéranto eldonas... Vidu p. 5

Enhavo

Kluba vivo ... 2
François instruas matematikon Esperante en lernejo de Hérouville ... 3 & 4
La centvorta mikronovelo ... 4
Ni eldonis allogan novelaron (kun intervjuo de la aŭtoro) ... 5
Pia priskribas sian vivon en Danujo ... 6, 7 & 8
Claude klarigas kial Gronlando "apartenas" al Danujo ... 9 & 10
Ne nur "teurgoule" - kiurarta paĝo ... 11
"Pant", la dana rubaĵdepona sistemo ... 11
Staĝu, kongresu ... 12

produktita de homo ne de AI

n-ro 294-a
Printempo 2026

**Listo de la kotizintoj 2025-2026.**
**Aliĝis al nia klubo 31 membroj.**
**Ĉu vi?**

**Brunet V., Cagnard C., Caron-Liray S., Charles V., Colbert J., Cottin B, Dalibert F., Danel K., Danel J., Dion C., Dufeu P., Duflot M., Dufresnes B., Ferrand C., Fortin F., Fortin J.-M., Hardel E., Langeois M., Lemarié S., Lemeltier M., Leprévost A.-M., Marlier-Riquier C., Plantade F., Rouget C., Sauvage J.-P., Sénécal Gé., Sénécal Gi., Tarlevé B., Troisgros R., Verstraete B., Verstraete V.**

**Vous ne trouvez pas votre nom dans la liste ?**
**Peut-être avez-vous oublié de régler votre cotisation. Il n'est jamais trop tard !**
**Rendez-vous sur le site esperanto-france.org/adherer et adhérez soit en ligne soit en y téléchargeant le bulletin d'adhésion à retourner par voie postale.**
**Contactez-nous en cas de difficulté** (*esperanto.herouville.14200@gmail.com*)




**Pas encore espérantiste ? Rejoignez-nous !**
**Nos cours se déroulent chaque mardi (hors vacances scolaires) de 17 heures 30 à 19 heures 00 à la Maison des Associations : 10.18 Le Grand Parc à Hérouville Saint-Clair**
Vous ne pouvez pas vous joindre à nous ? Inscrivez-vous au **cours en ligne gratuit I-Kurso.** Un **correcteur** vous sera attribué qui accompagnera votre progression au cours des **10 leçons** que vous suivrez **à votre rythme** jusqu'à recevoir votre attestation de formation.

**Renseignements :** esperanto.herouville.14200@gmail.com
: +336 09 42 10 06

**Du 22 au 25 mai, pendant le congrès de l'espéranto en France qui se déroulera à Hérouville Saint-Clair, de nombreuses activités, pour la plupart gratuites, sont proposées aux personnes qui souhaitent découvrir l'espéranto :**
**Colloque universitaire, projections de films, conférences, excursions, concerts, cours pour débutants.**
**Faites-le savoir autour de vous !**

→ Voir le programme en cliquant sur **ce lien**.

## Espéranto Normandie Hérouville Saint-Clair

@ESPERANTO-NORMANDIE · 33 abonnés

LIVE STREAMING

**Nous inaugurerons notre chaîne youtube à l'occasion du congrès.**
Pour qu'il nous soit possible d'émettre en direct à cette occasion, il est nécessaire que 50 personnes soient préalablement abonnées.
**Aidez-nous.**
**Abonnez-vous dès maintenant à l'adresse** : **https://www.youtube.com/@ESPERANTO-NORMANDIE.**

## Ili lernas matematikon en Esperanto.

*Parte de tiu ĉi artikolo aperis unue la 21an de marto en la franca en la ĵurnalo Ouest-France.*



Fotis Bertrand el Hérouville

*François estas ano de la klubo Hérouville-Eŝéranto.*
*Li estas doktoro pri matematiko.*

*Okaze de la venonta kongreso de Espéranto-France, li organizos la 22an de Majo en la universitato de Caen-Normandio la kolokvon* ***Esperanto kaj Matematiko, dialogo inter historio, lingvistiko, logiko kaj didaktiko.***

Ĵaŭdon, la 19an de marto, je la 10a horo matene, la dua grupo de CM1 kaj CM2 (kvara kaj kvina klasoj) eniris la matematiko-klasĉambron. Bonvenigis ilin François Plantade, instruisto ĉe la mezlernejo Victor Hugo, matematika esploristo kaj membro de IREM (Instituto por Esploro pri Matematika Edukado). En tiu ĉi laboratorio, kiu ekis antaŭ unu jaro, li instalis plurajn blankajn tabulojn kaj ludmatojn sur la planko.

### Nombri kaj kalkuli en Esperanto

La Lernejo Saint-Michel kaptis la okazon de la Matematika Semajno por proponi al siaj lernantoj aktualan, viglan kaj allogan seancon de matematiko. La 15a Matematika Semajno en Francujo okazis de la 14a ĝis la 25a de marto 2026, pri la temo "Egalecoj". La eksperimento komenciĝis per demando: "Kial uzi Esperanton por lerni nombri kaj kalkuli?" Ĉar ĉi tiu lingvo, elpensita en 1887 de la polo L.L. Zamenhof, estis konceptita kiel egaleca internacia lingvo," klarigas la esperantista matematikisto.

### Lernado per ludo

Post dek kvin minutoj, la infanoj jam parkere lernis la ciferojn, kaj ili kapablis nombri ĝis cent. Havante karton, sur kiu ili skribas la bazajn nombrojn, ili iras al la tabuloj por kompletigi la kunmetitajn nombrojn; "tiel ni analizas la dekuman sistemon." En la dua ses, en malgrandaj teamoj, ili uzas ludmatojn. Du paradizludoj kaj du serpento-ludoj, sur kiuj ili ĵetas ĵetkubojn kaj movas ludpecojn dum ili kalkuladas. Fine de la 45-minuta sesio, ili lernas kalkuli... en Esperanto, kompreneble. François Plantade petas ilin akcepti defion.

- "Mi instruos al vi kiel adicii, subtrahi kaj multipliki en Esperanto. Atentu!"
- "Kiam ni lernos dividon?" demandas lernanto.
- Tre baldaŭ.

La eksperimento daŭros en estonta sesio, post nepra klarigo de divido.

# ESPERANTO KAJ MATEMATIKO EN LERNEJO



**Esperanto ĉe la marĝenoj de la instruprogramoj**

Ĉi tiu eksperimento, kiu kunligas matematikon kaj Esperanton eble estas premiero. La klubanoj de la Hérouville-a Esperanto-klubo, plurfoje demandis al si kiel prezenti al infanoj lingvon tutmondan, kiu apartenas al neniu lando?

En Francujo, la instruado de Esperanto estis malpermesita en 1922 de la ministro pri nacia edukado. En 1936, la ministro de la registaro de la Popola Fronto, Jean Zay, denove permesis instrui ĝin.

Tamen, Esperanto neniam estis inkludita en la oficialaj programoj de lernejoj kaj universitatoj. Tamen , la ministerio permesis starigi specifajn projektojn en lernejoj, gviditajn de gepatroj aŭ de volontaj instruistoj. Tion ofte faris la Freinet-intruistoj.

**Eduka novaĵo**

François Plantade provizas kelkajn pliajn detalojn. “Ĉi tiu eksperimento sekvas tri sesiojn proponitajn pasintan jaron en la sama lernejo (pri la babilona numerado).

La unua sesio konsistis el repaso de la tempo-mezurado. La lernantoj fariĝis homa horloĝo. Ili ludis la rolon, ĉu de la ciferplato, ĉu de la hor - aŭ minutmontriloj. Tiajn edukajn agadojn ebligas la matematika laboratorio.

La dua sesio prezentis la originojn de la sesdekuma sistemo.

Poste, la lernantoj fariĝis mezopotamiaj skribistoj, kiuj multiplikis kojnoforme sur argilaj tabuletoj (tiam la ekzerco estis jam kutima).

La sekva eksperimento okazos en aprilo. Ĝi temos pri matematikaj rakontoj bazitaj sur la romano "La viro kiu kalkulis", kaj eksploros la koncepton de divido kaj spertigos la uzadon de imago por matematiki.”

# CENTVORTA MIKRONOVELA PAĜO

La ĉi-trimestra mikronovelo. **Ni esperas baldaŭ publikigi la vian.** Sendu ĝin al ***esperanto.herouville.14200@gmail.com***

**En la parko Bercy.**

Multaj ĝuas la printempan etoson en la pariza publika parko Bercy.

Viro tamen estas sola, kuŝanta sur benko, malbone protektita per malpura trivita kovrilo.

Li aspektas dormanta.
La vivo tiel lacigis lin...

Ĉirkaŭ li, la birdoj ĝoje kvivitas. La infanoj petolas, ludas piedpilkon, krias, ridas.
Li ne aŭdas ilin.


Promenantoj trankvile paŝadas sur la aleo.
Ili pasas sed ne vidas la senhejmulon. Ili prefere rigardas for.

Ŝajnas, ke li ne estas pli ol vata ombro.

Neniu atentas lin.

Reklamo skribita sur la granda plasta aĉetsako, kiu entenas lian tutan maldikan pakaĵon asertas:
"Ĉi tiu sako enhavas ĉiujn niajn malgrandajn atentopruvaĵojn".

Verkis
Bertrano el Ĵibervil'




**Hotelo Paradizo. Gérard Sénécal.**

Novelaro

ISBN : 978-2-9599130-1-3
140 paĝoj - 13 X 22 cm
Éditions Hérouville -Espéranto, marto 2026

**1975. En Koronios, la konstruata hotelo Paradizo de la greka masonisto Dimitrios Kostantinidos akceptas la francan familion Portal, siajn unuajn klientojn. Bebo, poste knabineto, la juna Milena Kostantinidos travivas feliĉajn tagojn.**
**Plurajn jarojn poste, la japana studanto Takeŝi Kanamori, neatendite vojaĝas al Grekio kun iu S-ro Bernard Portal. Tiu ĉi deziras revidi hotelon en kiu li feriis, kiam li estis infano. Ŝajnas, ke ĝi estas de longe fermita!**
**2015. En hospitalo, Bernard Portal ne kredas tion, kion li vidas! La flegistino, kiu zorgas pri li ... Ĉu ŝi eble estus Milena, la filino de la greka masonisto?**

12 €

**ALKLAKU ĈI TIE POR MENDI**
**aŭ sekvu tiun ligilon**
**https://tinyurl.com/Libroservo**

Intervjuis Vero el Ĵibervil'


**Normanda Esperanto-bulteno:** Ĉu *Hotelo Paradizo* estas via unua libro?
**Gérard Sénécal:** Jes, tiu novelaro estas la unua eldonita. Ĝi konsistas el tri noveloj, kies titoloj estas *Hotelo Paradizo*, *Birdo Flugas* kaj *Ĉu Nova Paradizo?* La unua novelo donis sian nomon al la tuta novelaro.
**Normanda Esperanto-bulteno:** Kiel naskiĝis via emo por verki? Ĉu vi verkas ankaŭ france?
**Gérard Sénécal:** Mi ĉiam ŝatis skribi. Kiam mi estis juna instruisto, mi malkovris kaj aplikis la pedagogion Freinet, kiu rekomendas korespondadon inter lernantoj de diversaj urboj aŭ regionoj, ĉu proksimaj, ĉu malproksimaj. Bona korespondado inter lernantoj postulas bonan kaj oftan korespondadon inter la instruistoj. Mi pensas, ke mia emo por verki naskiĝis tiuepoke, kaj ne malaperis poste. En la franca, krom la nenombreblaj manskribitaj leteroj, samkiel multaj homoj, mi provis verki kelkajn poemojn. Nenion interesan.
Ankaŭ en Esperanto, miaj unuaj valoraj verkoj estis leteroj! En 2000, okaze de nia unua vojaĝo al Japanujo, mi sendis multajn mane skribitajn leterojn al eblaj gastigantoj, kiuj same respondis pere de bele skribitaj leteroj enmetitajn en kovertojn, sur kiuj troviĝis mirindaj poŝtmarkoj! Alia epoko! Senkomputila!
**Normanda Esperanto-bulteno:** Ĉu vi havas apartan metodon por verki? Kutimajn horojn por verki? Notlibreton por tuj noti, kion vi hazarde rimarkis?
**Gérard Sénécal:** Ne, ne kaj ne! Mi ne estas verkisto! Nur amatora verkisto, sen metodo, sen horaro. Mi skribas kiam mi samtempe havas ideon kaj tempon, por tion fari. Povas okazi, ke mi verkas dum pluraj tagoj sinsekve, kiam la ideo postulas, ke mi ĝin trairu ĝis la fino. Kelkfoje sekvas tagoj, semajnoj sen nova ideo por daŭrigi. Tiam mi patience atendas, nenio urĝas, neniu devigas min sendi la taskon!
La ideoj naskiĝas diversmaniere. Ĉu post observado de homoj en aparta loko (greka haveno en *Hotelo Paradizo*), ĉu post persona sperto (*Ĉu Nova Paradizo?*) ĉu ankoraŭ post informoj aŭditaj en la radio. Lastatempe, dum promenadoj en la montaro venis la ideoj, kiuj ebligis verki la lastan parton de la kvara novelo.
**Normanda Esperanto-bulteno:** Ĉu vi do havas novan projekton?
**Gérard Sénécal:** Ĉu? Eble! Mi jam verkis kelkajn paĝojn, sed konstruita rakonto kun komenco kaj fino ne ankoraŭ ekzistas. Tio signifas, ke nenio certas pri la estonto!

# FOKUSO AL DANUJO KAJ GRONLANDO.



Verkis Pia
el Albertslund (DK)





Danujo, mia lando, situas norde de Germanujo. Ĝi havas teran landlimon. Oriente, maro apartigas ĝin de Svedujo. Ĝi aspektas kiel makuleto sur mapo. Hodiaŭ nia loĝantaro estas 6 milionoj entute.
Tamen temas pri la plej granda lando en okcidenta Eŭropo... sed nur se oni inkluzivas Gronlandon! Kvankam Gronlando "apartenas" al Danujo, kutime oni ne enkalkulas ĝin kiel parton de Danujo mem. Mi klarigos plu poste pri Gronlando kaj la Feroaj Insuloj...
Danujo konsistas el Jutlando, kiu estas granda duoninsulo, Fueno kaj Selando kaj el multaj etaj insuloj.
La klimato bedaŭrinde ne estas tre varma... Vintre, la tagoj estas mallongaj kaj malhelaj; ili daŭras nur 8 horojn sed somere ili daŭras preskaŭ 15 horojn!
Naturo malsamas: en Jutlando troviĝas alta postglaciepoka "dorso", sed Fueno kaj Selando estas pli ebenaj.
La plej alta "monto" en Danujo estas Ejer Bavnehøj kun... 172,54 metroj super la marnivelo!
Kopenhago, la ĉefurbo, troviĝas sur Selando. La du aliaj plej grandaj urboj nomiĝas Aarhus, en Jutlando, kaj Odense, en Fueno. La tri urboj estas universitataj urboj, kaj pro tio amaso da gejunuloj loĝas tie.
Mi loĝas 15 kilometrojn norde de Kopenhago.

Danujo estas monarkia lando; nia reĝo kaj lia familio estas ege popularaj. La kronprinco strebas vivi kiel eble plej ordinare. La konstitucia tasko de la reĝo limiĝas al la subskribo de leĝoj. La leĝoj estas kaj prezentataj kaj aprobitaj de nia parlamento, kiu nomiĝas "Folketinget" kaj konsistas el 179 deputitoj: 175 el Danujo, 2 el Gronlando kaj 2 el la feroaj Insuloj. La parlamento - tute ne la reĝo - respondecas pri la ŝtataj aferoj. La reĝo Frederiko la 10a estas nur simbolo de la ŝtata unueco.
De 2019, la ĉefministro nomiĝas Mette Frederiksen. Ŝi estas socialdemokrato. Dum la pandemio, ŝi estis ege populara. Ni voĉdonis la 24an de marto. Malpli da deputitoj de ŝia partio estis elektitaj, ŝia partio tamen venkis en la baloto, sed ŝi devos alianciĝi kun la centristoj... Ni vidos ĉu ŝi sukcesos konservi la povon.
Norvegujo kaj Svedujo havas similan sistemon – nur Finlando havas prezidenton. Tia estas Skandinavujo.

Ĉi tie, oni ricevas pension ekde la aĝo de 67 jaroj. Tiu aĝo estis ĵus altigita de 65 jaroj. Bedaŭrinde la pensio estas malgranda; tamen plejmulto de la homoj havas kroman pension el sia laborvivo. Por rajti ricevi ŝtatan pension vi devas konstante loĝi en Danujo dum 40 jaroj.
La ĉefa kaj oficiala religio estas la protestanta; sed maljunuloj estas preskaŭ la solaj, kiuj vere praktikas en preĝejoj.
Niaj impostoj ŝajnas altaj al multaj, sed la entuta procentaĵo, kiu foriras de la malneta salajro, ne estas pli alta ol en aliaj kompareblaj landoj. Ni, per la imposto, pagas ankaŭ la sanasekuron kaj la asekuron kontraŭ senlaboreco kaj diversajn aliajn kotizojn, kiujn oni en aliaj landoj pagas per apartaj asekuroj.
Tamen, nia sansistemo mem estas malsana pro manko de mono. Se oni ekzemple estas implikita en trafik akcidento, kaj transportita al malsanulejo, kutime oni devas atendi dum horoj kaj horoj antaŭ ol venos kuracisto! Atendolisto por nevivdanĝeraj malsanoj estas kilometrojn longaj. Gravedaj virinoj riskas dum nasko esti transloĝigataj al alia malsanulejo!

Tamen multaj aferoj koncernantaj la sanon estas senpagaj. Ĉefe la vizito al kuracisto, kiu povas plusendi vin al alia kuracisto aŭ malsanulejo, kaj tiuj servoj estas tute senpagaj. La pli grandan parton de elspezoj por medikamentoj, okulvitroj, fizioterapio kaj dentistoj vi devas pagi mem.

Ni havas grandiozan biblitekosistemon. Eblas pruntepreni librojn, filmojn, muzikon ktp. senpage. Ĉe la biblioteko okazadas ofte koncertoj, prelegoj, teatraĵoj por infanoj.

Iom pri kunvivadaj formoj – multaj homoj ankoraŭ geedziĝas, sed aliaj preferas vivi kun kunulo sen geedziĝa atesto, kaj samseksemaj kaj GLAT-homoj estas akceptataj, kaj ili rajtas kunedziĝi. Kutima familio havas 2 infanojn, kaj ambaŭ gepatroj rajtas resti hejme kun la bebo post ĝia naskiĝo, la patro dum 13 semajnoj, la patrino dum 26 semajnoj. Poste, la bebo povas esti prizorgata en bebovartejo, kaj je la aĝo de 3 jaroj la infano povas viziti infanĝardenon.
Kiam la infanoj havas 6-7 jarojn, tiam venas tempo por lernejo. La lernantoj komencas en la 0a klaso kaj kutime ili vizitas bazlernejon dum 9 jaroj. Diversaj ebloj sekvas poste: gimnazio, komercaj lernejoj, aŭ metilernejoj, laŭ la emo de la gejunuloj por longaj studoj.
Multaj gepatroj malŝatas la senpagan bazlernejon, kaj pro tio ili elektas multekostajn ”liberajn” lernejoj. Tie la gepatroj pagas parton de la kostoj. Mia pli juna filino estas instruistino en bazlernejo kaj rakontas pri la malbonaj laborkondiĉoj en publikaj lernejoj.

Laŭdire kaj laŭleĝe viroj kaj virinoj havas samajn rajtojn en Danujo – sed laŭ mi tio estas nur sur papero. Eble multloke la salajro egalas, sed plu estas pli bonaj ebloj por viroj – ankaŭ ĉi tie!



Pro tio, ke mi loĝas apud Kopenhago, mi ŝatus rakonti pri la plej famaj vidindaĵoj de la urbo. Kiu ne konas la rakonton pri La Niksino (aŭ Marvirineto), la fama skulptaĵo, ĉiam sidanta sur ŝtono en la haveno de Kopenhago? Ŝi estis fakte dufoje senkaptigita pro kaj politikaj kaj artaj motivoj! La Niksino estis kreita de bierfaristo laŭ fabelo de H.C. Andersen (kiu naskiĝis en Odense).
En Kopenhago kaj en ĝia ĉirkaŭajo estas du plezurparkoj, kiuj nomiĝas Tivoli kaj Bakken. Tivoli estas iom pli altkultura, distra kaj ripoziga parko. Kvankam troviĝas karuseloj por infanoj, ĝi impresas pli bone ol Bakken, kiu havas krom ĉiuj specoj de karuseloj ankaŭ drinkejojn. En Kopenhago estas multege da diversaj muzeoj kaj belega botanika ĝardeno. Tie estas kompreneble floroj, arboj kaj forcejoj, kie vi povas vidi sukulentojn, kaktojn ktp. Papilioj loĝas en propra halo kaj flugas libere inter la vizitantoj kaj la floroj. Ĝi estas mirinda, kaj mi ŝategas viziti ĝin, kutime kun mia nepo. La plej granda domo nomiĝas Palmodomo.Tie, tropikaj kaj subtropikaj plantoj kaj ankaŭ arboj videblas. Tiu parko estas tre uzata de multaj homoj somere.

En Roskilde, la iama ĉefurbo, situas vizitinda katedralo, kiu estas en la listo de mondheredaĵoj ĉe UNESKO. Aarhus, la dua plej granda urbo estas belega kaj ĉarmega, situanta ĉe marbordo kaj kun rivereto, kiu trafluas la urbon. Dum multaj jaroj ĝi estis kovrita per betonaj elementoj.

Komence mi skribis, ke mi ŝatus klarigi ion pri Gronlando kaj la Feroaj Insuloj.
Bedaŭrinde, Danujo praktikis koloniismon en la 1800aj jaroj kaj posedis diversajn koloniojn, kaj en Afriko, en Karibio kaj norde, kiel ekzemple Gronlandon kaj la Virgulininsulojn, kiuj situas proksime al Usono.
Ĝis kiam sklaveco estis malpermesita en Usono en 1865, Danujo, kiu sendis varojn al Afriko, tie kaptis sklavojn kaj sendis ilin al Usono por ke ili laboru en la sukeraj kaj kotonaj kampoj. Poste la Virgulininsuloj perdis sian komercan bazon kaj ne plu vere utilis al Danujo.

Pro tio, kiam, dum la Unua Mondmilito, en 1917, Usono proponis aĉeti la insulojn, timanta, ke ili estus vendotaj al Germanujo, Danujo konsentis vendi ilin. Tiel dana posedaĵo fariĝis usona!
La danaj nordaj kolonioj havis alian sorton. Precipe Gronlando, kies origina popolo, la inuitoj, elmigris el Kanado jarcentojn antaŭ ol la vikingo. Eriko la Ruĝa, instigis siajn kamaradojn entrepreni esplor-vojaĝojn norden.
Tie oni trovis popolon kredanta je animisma religio, kun ŝamanoj, kiuj per grandegaj tamburoj allogis la ĉeestadon de dioj. Kvankam jam de 1721 Hans Egede, dana pastro kaj misiisto, komencis multjaran strebadon kristianigi ilin, li ne tuj sukcesis.
En 1953 Gronlando ĉesis havi la staton de dana kolonio kaj ricevis aŭtonomion, sed tamen ĝi daŭre estas pli dependa de Danujo ol la Feroaj Insuloj.
Pro siaj mineraloj, Gronlando estas tre valora por regantoj kiel ekzemple Donald Trump, kiu ŝategus aĉeti rajtojn por ekspluati la tertrezorojn kaj tiel detrui la medion de la mizeruloj, kiuj plu loĝas tie.
De jaroj, la gronlandanoj havas grandegajn problemojn estante "danaj". Ekzemple, kiam infanoj vizitas la unuan klason, la instrulingvo estas la dana, ne la gronlanda. Notinde estas, ke la du lingvoj tute ne similas. Do, la infanoj devas tuj lerni la danan. Kompreneble, tio estas tre malfacila. Por ricevi universitatan aŭ altnivelan edukadon ili devas transloĝiĝi suden al Danujo. Por tiuj, kiuj ne sukcesas, estas risko, ke ili estos senhejmuloj. Multaj fariĝas alkoholdependaj.
La Feroaj Insuloj akiris aŭtonomion en 1948, kaj la instrulingvo en la lernejoj estas la feroa, do la infanoj lernas la danan kiel fremdan lingvon. Homoj, kiuj loĝas tie, havas pli bonan ŝancon por havi bonan vivon kaj edukadon ol la gronlandanoj.
La feroanoj, estas posteuloj de vikingoj, dum la gronlandanoj estas viktimoj de imperialismo fare de Danujo, kies sistemon kaj vivmanieron ili delonge klopodas adopti.
Bonŝance, junaj gronlandanoj agnoskas la valoron de siaj propraj tradicioj kaj kulturo. Ili fakte instigas unu la alian konservi la malnovajn morojn.
En Danujo, rasismo estas kreskanta, kaj ĉar gronlandanoj fizike ne similas al la blondaj danoj kun bluaj okuloj, ili ofte havas malfacilan vivon.
Tamen en la nunaj malagrablaj momentoj, ni komune "batalas" kontraŭ la usona minaco, gvidata de prezidento Donald Trump, kies deziro estas, ke Gronlando apartenu al Usono. Ŝajnas, ke li estas obsedata de la ideo okupacii aŭ posedi Gronlandon.



## Ĉu vi sciis?

Ĉiu vi sciis, ke **la reĝo Frederiko la 10a, kiam infano, studis en Normandio**?
Fine de la somero de 1982, la Kronprinco Frederiko de Danujo kaj lia frato Princo Joachim, unu jaron pli juna ol li, studis al *l'école des Roches.*
Temas pri privata ege multekosta pensiono, en Verneuil-sur-Avre (departemento Eure).
Ilia patro, la Princo Henriko - naskiĝinta en Talence, en Gironde, Henri de Laborde de Monpezat - deziris, ke ili havu paŭzon de sia dana lernado per frekventado de lernejo en lia denaska Francujo.






La usona prezidento Donald Trump plurfoje deklaris, ke Usono konkeros Gronlandon "iel aŭ alie".

Gronlando estis dana kolonio ĝis 1953. Tiam ĝi fariĝis provinco, akiris aŭtonoman statuson antaŭ ol iĝi, 30 jarojn poste, konsistiga lando (1) de la reĝlando Danujo.

Kvankam ekzistas multaj disputpunktoj inter Danujo kaj Gronlando, ties ĉefministro Jens Frederik Nielsen deklaris: "Se ni devas elekti inter Danujo kaj Usono, ni elektas Danujon."

Laŭ opinienketo, 85 % el la gronlandanoj kontraŭas aliĝon al Usono, dum nur 6 % subtenas ĝin. Gronlando situas proksimume egaldistance de Usono kaj Danujo. Oni do povus demandi sin, kial la teritorio "apartenas" al Danujo. Jen la demando, kiun ni metis al nia amiko Claude Rouget, kiu instruas historion en Norvegujo.

(1) : *Konstituiga lando estas teritoria subdivido ne-sendependa, kiu estas parto de pli granda regno, de suverena kaj sendependa unueca ŝtato. Ekzemple, Anglujo, Skotlando, Kimrujo kaj Nord-Irlando estas konstituigaj landoj de la Unuiĝinta Reĝlando.*

*La fakto, ke Gronlando estas dana teritorio, estas rezulto de la historio kun granda H, kaj tri nomojn oni devas mencii: Eirik Raude (ĉ. 940– 1000), Margrete Valdemarsdatter (1353–1412) kaj Jean-Baptiste Bernadotte (1763–1844).*
*En tiu ĉi artikolo mi ne pritraktos la alian popolon (inuitoj) kiuj loĝis sur Gronlando de pluraj jarcentoj. Ili loĝis pli norde ol la skandinavoj, kaj ŝajne sen konfliktoj kun ili.*



**Islandano Eirik Raude (Enriko la Ruĝa)**

Laŭ islanda sagao verkita en la 12a jarcento, Eirik Raude estis tiu, kiu malkovris Gronlandon kaj tie instaliĝis en 982. Li naskiĝis en sudokcidenta Norvegujo (Rogaland) kaj de tie migris kun sia patro al Islando. Tiutempe Islando estis loĝata de norvegoj kaj dependis politike, religie kaj kulture de la norvega ĉeftero. Eirik Raude esploris la sudokcidentan parton de Gronlando, kaj trovis, ke tie oni bone povis vivi pro verdaj paŝtejoj kaj milda klimato. La vorto Gronlando fakte signifas la “verda lando”.

Dum pluraj jarcentoj norvegoj vivtenis sin tie per ŝafa bredado kaj fiŝkaptado. La kolonio prosperis kaj arkeologoj trovis spurojn de 290 domoj. Oni ankaŭ scias, ke estis 16 preĝejoj, kaj historiistoj kalkulis ,ke ĝis 4.000 homoj vivis dum Mezepoko sur Gronlando.
Fine de la 14a jarcento perdiĝis kontakto kun skandinavoj sur Gronlando. Historiistoj ne scias kial, sed plej verŝajna klarigo estas klimatŝanĝiĝoj. Fariĝis pli malvarme kaj pli malfacile vivteni sin. Eble ankaŭ pesta epidemio malfortigis la kolonion.



### Dana reĝino Margrete la 1-a

Margrete estis unu el la plej talentaj politikistoj el Skandinavujo. Ŝi estis filino de dana reĝo, edziniĝis al norvega reĝo, kaj post morto de sia patro kaj edzo, ŝi lerte kaj sukcese fariĝis reĝino de Danujo kaj Norvegujo, kvankam ŝi teorie ne rajtis je tiuj titoloj. Ŝi ankaŭ ruze igis sin esti elektata reĝino de Svedujo. En 1397, ŝi kunvokis gravulojn de la tri landoj en Kalmar (Svedujo), kaj starigis la t.n. kalmaran union kun unu sola reganto por la tri landoj.

La trilanda unio ĉesis, kiam Svedujo forlasis ĝin en 1523, sed la dulanda unio inter Norvegujo (inkluzive de Islando, Gronlando kaj Feroaj insuloj) kaj Danujo daŭris ĝis 1814.



### Franca generalo Bernadotte

Meze de la napoleonaj militoj, en 1811, svedaj nobeluloj venis al Parizo proponi al generalo Bernadotte iĝi reĝo de Svedujo. Kial? Ĉar Bernadotte estis lerta militisto, kaj svedoj esperis, ke li povos militi kontraŭ Rusujo kaj rekonkeri Finn-landon, kiun Svedujo perdis dum milito kontraŭ Rusujo en 1809. Bernadotte konsentis esti reĝo de Svedujo, sed rezignis pri la freneza ideo denove militi kont-traŭ Rusujo en 1809. Bernadotte akceptis esti reĝo de Svedujo, sed rezignis pri la freneza ideo denove militi kontraŭ Rusujo.

Eblas imagi jenan dialogon inter Bernadotte kaj liaj konsilistoj:
– “Kiu lando najbaras Svedujon okcidente? demandas Bernadotte.
– Norvegujo.
– Al kiu ĝi apartenas?
– Al Danujo.
– Bone! Ni povas militi kontraŭ Danujo kaj preni Norvegujon, kiel konsola premio je Finnlando!”

**Tiel fakte okazis. En januaro 1814, la pactraktato de Kiel (tiam en Danujo) agnoskas, ke ekde nun, Norvegujo estas sveda teritorio. La pactraktato fakte mencias, ke Gronlando kaj Islando restas sub la regado de Danujo. Bernadotte (konata en Norvegujo kiel reĝo Karl Johan) tutsimple ne interesiĝis pri teritorio longe for de Svedujo, kaj apenaŭ defendebla okaze de milito.**
**Kaj jen kiel Gronlando, unue plene norvega, fariĝis dan-norvega en 1397, kaj restis post 1814 plene dana posedaĵo.**

Verkis Claude Rouget el Tromsø (Norvegujo) laŭ peto de Bertrano.
Tiu-ĉi artikolo estis publigita en Norvega esperantisto 1/2026

**DANujO**

**ĉefurbo : Kopenhago**
**dek tri fojojn pli malgranda ol Francujo**
**6 milionoj da loĝantoj**
**MEP pokape: 64 500 €**

Merci : Tak
Oui : Ja
Non : Nej
Bonjour : Hej
Au revoir : Farvel

**GRONLANDO**

**ĉefurbo : Nuuk**
**kvar fojojn pli granda ol Francujo**
**57 miloj loĝantoj**
**MEP pokape: 51 000 €**

Merci : qujanaq [krouyanak]
Oui : aap [aap], suu [souuu]
Non : naamik [na-amik]
Bonjour : kutaa [kouta-a]
Au revoir : inuulluarit [inouchlouarit]

# KUIRARTA PAĜO



"Teurgoule" estas unu el la plej famaj normandaj specialaĵoj. Sed ne nur ni uzas rizon kiel deserton.
Ankaŭ en Danujo, estas alia bona tradicia deserto tutsimpla kun rizo. Ĝi nomiĝas "Risengrød". Jen la recepto de Pia.

**"Risengrød' (Riza kaĉo)**

Ingrediencoj:
→ 1 litro da lakto; 1/4 litro da akvo; 1 pinĉremo da salo; Cinama sukero

Boligu akvon kaj salon kaj zorge kirlu dum kvin minutoj. Aldonu lakton.
Kiam la tuto denove bolas, malkovru la poton kaj kuiru plu sur malforta fajro ĝis la rizo dikiĝos kaj iĝos krema.
Atentu, zorge kirlu de tempo al tempo.
Surtabligu kun butero meze de la telero kaj ŝutu cinaman sukeron. Manĝu!

# PANT, LA DANA DEPONA SISTEMO


Inter 1982 kaj 2022, vendi trinkskatolojn en Danujo estis malpermesite. Post jaroj da disputo kun Eŭropa Unio, la danoj finfine denove permesis ilin vendi, sed starigis la tre efikan "Pant" depono-sistemon: 99.7 % de la boteloj kaj skatoloj estas recikligataj en Danujo, kompare kun proksimume 60 % en Francio. La sistemo estas regata de la privata, neprofitcela kompanio *Dansk Retursystem*. Kiam vi aĉetas botelon aŭ skatolon de trinkaĵo, vi pagas kaŭcion, kiu estos plene repagata al vi kiel rabat-kupono kiam vi redonos la malplenan ujon.

Kaŭcioj varias laŭ la tipo de ujo (vitro, plasto, aluminio) kaj ĝia grandeco:

- Ujo A: 1.00 DKK (proksimume €0.13) por ladskatoloj kaj vitraj boteloj malpli ol unu litro.
- Ujo B: 1.50 DKK (proksimume €0.20) por plastaj boteloj malpli ol unu litro.
- Ujo C: 3.00 DKK (proksimume €0.40) por ujoj de 1 ĝis 20 litroj.

Krom vino, brando kaj lakto, preskaŭ ĉiaj trinkaĵoj estas submetitaj al la depona sistemo en Danujo: biero, karbonataj trinkaĵoj, mineralakvo, limonado, siropoj, frukto- aŭ legomsukoj, kaj densaj fruktosukoj (angle smoothies).

Preskaŭ 3.000 superbazaroj kaj vendejoj estas ekipitaj per aŭtomataj deponmaŝinoj, kiuj skanas la strekkodon kaj la emblemon "Pant", kalkulas la repagon kaj presas por vi la rabatkuponon.
Infanoj kompreneble lernas recikligi tre frue, ĉar "Pant" ofte estas ilia unua rimedo enspezi poŝmonon.




Kaj en la cetero de Eŭropo? Aliaj eŭropaj landoj inspiriĝis de la sukcesa dana sistemo.
Nuntempe, 19 eŭropaj landoj (inkluzive de Gronlando) funkciigas deponan sistemon. Aliaj decidis tion baldaŭ fari: Unuiĝinta Reĝlando (2027), Ĉeĥujo (2026), Portugalujo (2026), kaj Hispanujo.
Francujo estas unu el la malmutaj landoj, kiuj ankoraŭ ne havas nacian deponan sistemon por boteloj kaj ladskatoloj. Pri la afero oni multe debatis en la lastaj jaroj, sed ĝia efektivigo ankoraŭ alfrontas reziston de la fabri-kantoj kaj de lokaj aŭtoritatoj. Francujo bedaŭrinde ankoraŭ tute postrestas en recikligado, kaj ne transiris de senzorga konsuma sistemo al virta cirkla ekonomio.

**De la 4a ĝis la 6a de aprilo okazos**
## la 78a kongreso de SAT Amikaro en Greziljono.

SAT-Amikaro

→ **Ligilo al la programo** : https://shorturl.at/AWZjV
→ **Ligilo al la aliĝilo** : https://shorturl.at/0WCQQ

## De la 17a ĝis la 25a de aprilo PRINTEMPaS en Greziljono.

**Kursoj** kun Zsofia, Birke, Marion kaj Paweł
KER-**ekzamena**-sesio la 25an kaj la 26an

→ **Pli da informoj :** https://gresillon.org/article300.html
→ **Ligilo al la aliĝilo :** https://shorturl.at/RneHt

## De dimanĉo, la 26a de aprilo ĉ. la 18a horo, ĝis sabato, la 2a de majo 2026 posttagmeze

- Promenado bicikla kun BEMI
- Ĥora kantado kun Interkant'
- Lerni E-on, praktiki Biblion
- Basen-laboroj

→ **Pli da informoj** : https://gresillon.org/article301.html
→ **Ligilo al la aliĝilo** : https://shorturl.at/RneHt

ESPERANTO S.A.T.

<u>**León Hispanujo**</u>
<u>**19a - 26a de Julio**</u>

111-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
GRAZ
1.-8.8.2026

## <u>De la 21a ĝis la 23a de aŭgusto: les Estivales de Plouézec</u>

3 jours de fête, chants, danses, conférences et activités en Esperanto.

*Pli da informoj: reyssetplouezec@hotmail.fr - 07 83 10 83 68*
*<u>http://www.pluezek-esperanto.net</u>*